

GRUPO ESPERANTISTA

"FIDO KAJ ESPERO"

VALLADOLID

Año 2006 N° **220**

ENERO-FEBRERO

Dirección Postal: Apartado, 119; 47080 VALLADOLID

Adherido a la Federación Española de Esperanto



Un año más, con renovado entusiasmo y con ilusión, que nunca nos debiera faltar, aún en los momentos difíciles, henos de nuevo dispuestos a la tarea, grata por otra parte, de haceros llegar, mediante este modesto Boletín, comentarios, noticias e informaciones relacionadas con el mundo del Esperanto y de aquello que, sin tener relación directa con él, consideramos de interés general.

Lamentablemente, como ya venimos diciendo reiteradamente, la actividad esperantista en Valladolid está en sus horas más bajas y debiera ser labor de todos nosotros intentar sacudirnos la apatía y la desgana que, por diversos motivos, nos invade, para superar esta racha.

Aún cuando no sea fácil, como en el pasado, reunirnos con carácter periódico, si que podemos esforzarnos para, de un modo u otro, difundir y propagar el Esperanto, utilizando para ello todos los medios que, actualmente, tenemos a nuestro alcance.

Cada uno, según sus posibilidades, debiera esforzarse para conseguir esta meta y para ello, todos y cada uno debiéramos aprovechar las oportunidades que se nos presenten para lo cual, sin duda alguna, el recurrir a información que se nos facilita por internet, sería un elemento primordial y, por otro lado, tomar en consideración, la oportunidad que nos brindan la sección de Cartas al Director que aparecen en todos los periódicos.

Naturalmente que, si alguno se anima, nos gustaría que nos informara para comunicárselo a los demás y animarles a seguir dicho ejemplo, así como vuestra colaboración directa a nuestro Boletín, mediante el envío de algún artículo.

Prahistorio de Fondaĵo Esperanto

Eklerninte Esperanton fine de la jaro 1934, mi, la subskribinto, komencis aktivi en ĝia enlanda movado jam la sekvantan jaron, kio ebligis al mi iom post iom kontakti, kaj eĉ amikiĝi, kun pluraj esperantistoj en- kaj ekster-urbaj. El la unuaj, mi volas precipe distingigi, en tiu ĉi kunlaboraĵo, k-don Petro Casanovas Manent, longatempa aktivulo en la proleta Esperanto-movado de la kataluna urbo Sabadell, kie li, proksimunme la jaron 1931, mem fondis delegacion de SAT (*Sennacieca Asocio Tutmonda*), kaj reliefe kunlaboris en la tiutempe tre aktiva Barcelona organizacio PUIL, *Proletesperantista Unio de Iber-Amerikaj Landoj*. K-do Petro Casanovas Manent, kelkafoje skribe uzanta sian pseŭdonimon ***Ballaruk***, ĉiam vigle alternigis sian efikan kontribuon ne nur en la tiel nomata Esperanto-movado neŭtrala, sed ankaŭ en tiu proletesperantisma de la menciita organizacio PUIL, kie liaj intimaj amikoj s-ano Mikaelo Sender Brota kaj d-ro Jozefo Borrell Soldevila, ambaŭ el Barcelono, okupis gravajn postenojn.

Freŝe restas en mia memoro tiu trio, kun kiu mi ofte kontaktis precipe en la periodo post nia intercivitana milito. K-do *Ballaruk* daŭre min vizitis hejme kaj eĉ ĝentile nomis mian ŝuriparistan butikon, en kiu ĉiuhore mi deĵoris pro panakira laborado, la esperantista renkontejo de Sabadell, manke de lokalo por la tiutempa ankoraŭ ne renaskiĝinta Esperanto-klubo loka...

Ĉar en tiu postmilita periodo, ekde la jaro 1939, la katalunaj esperantistoj diversurbaj kutimis daŭre sin renkonti en Barcelono, cele interparoli pri la revigligo de la Esperanto-movado, ofte ankaŭ inter la kunvenantoj troviĝis s-ano **Mikaelo Sender Brota**, tiam ĵusa HEF-membro, kies intervenoj ĉiam baziĝis sur la sama argumento, laŭ kiu por serioza progresigo de Esperanto nepre necesis starigi fondaĵon kun laŭeble plej sufiĉa kapitalo. Ja tiun lian ideon ĉiuj trovis bona, sed la sukceson de ĝia realigo oni kalkulis ne atingebla...

Un, la senlaca s-ano Sender ne malesperis, sed plu multiplikis sian agadon serĉe de altruismaj kontribuantoj por sia ideala fondaĵo. Tiucele li ofte kontaktis kun pluraj gesamideanoj diversurbaj, precipe el Sabadell, en kiu li plurafoje vizitis mian ŝuriparistan butikon, por amike komentarii siajn demarŝojn rilatajn al tiu sia revata fondaĵo.


Feliĉe, li fine sukcesis varbi, por tiu sia ĝis tiam utopia projekto, s-rinon **Eliza Ferrándiz**, tiutempe vidvino de lia bedaŭrata amiko **Petro Casanovas Manent**. Ŝi, memore al sia forpasinta edzo, mecenatece destinis konsiderindan monsumon, kune kun tre valora tereno en Barcelono, kiel altruisman donacon al la ekde tiam fariĝinta serioza projekto de "Fondaĵo Esperanto".

Aparte gravan taskon en la fina oficialigo de "Fondaĵo Esperanto" oni ŝuldas al tiutempa prezidanto de HEF, *Hispana Esperanto-Federacio*, d-ro **Mikaelo Sancho Izquierdo**, danke al kies efikaj demarŝoj oni sukcesis oficiale starigi ĝin en Zaragozo, la jaron 1969, kiel kulturan societon "bonfaran-docentan".

Ekde tiam, tiu tre grava HEF-institucio, kia fakte estas la menciita "Fondaĵo Esperanto", nunatempe diligente gvidata de ĝia direktoro Antono del Barrio, jam tre pozitive aktivadas precipe subvencie al diversaj aranĝoj rilataj al la Hispana Esperanto-Movado.

Raportis Vincento Hernàndez Llusera, HEF-ano No. 286

AUSTRIA Y MOZART



Desde que ha empezado este año, podemos decir que estamos en el año de Mozart, porque se celebran los doscientos cincuenta años de su nacimiento en la ciudad austriaca de *Salzburgo* un 27 de enero de 1756. Verdaderamente cuando visitamos Austria, aunque no se celebre ningún aniversario, enseguida nos damos cuenta de que casi todo gira entorno de Mozart, al que se le dedican desde los más variados recitales musicales, incluso con los músicos vestidos de época, hasta los famosos bombones con la efigie de este autor. Con esto queremos decir que Austria ha sabido sacar provecho de uno de sus hijos más insignes y conocidos en el mundo por ser un auténtico niño prodigio, que a la edad de seis años ya era un intérprete destacado en el piano, aunque también tocaba el violín junto a su hermana Nannerl, y por ello su padre, Leopold decidió llevarle en gira por las cortes europeas para darle a conocer.

Wolfgang Amadeus Mozart componía con extrema facilidad y genialidad mientras con su padre, viajaba a Munich, Viena, París y Londres. Volvieron a Salzburgo y a instancias de su padre que trabajaba como Maestro de Capilla del príncipe-arzobispo de Salzburgo, Mozart entró en 1769, con trece años, como *"Konzertmeister"*a componer para el arzobispo, aunque no de buena gana. En esos años compuso muchas obras de piano y violín, así como la ópera cómica "La finta semplice" y Bastian y Bastiana.

Padre e hijo marcharon a Italia tres años , conociendo a muchos otros músicos y siendo condecorado por el Papa como Caballero de la Espuela de Oro, y en 1970 le encargaron escribir su primera gran ópera, con la que se dio más a conocer y volvió a Salzburgo a componer con enorme celeridad sinfonías, cuartetos para cuerda, óperas y conciertos para violín y orquesta. Cansado de trabajar para el arzobispo Colloredo, y considerando que le pagaba poco, buscó un trabajo mejor remunerado por Alemania y por París, a donde viajó con su madre y donde esta falleció, pero no lo logró. No obstante en 1781 Mozart rompe sus relaciones laborales con el arzobispo de Salzburgo y decide trasladarse definitivamente a Viena, conde compone "El rapto del Serrallo, encargada en 1782 por el Emperador José II. Ese mismo año se casa con Constanza Weber y prosiguieron su vida, frecuentemente perseguidos por las deudas, y amonestados por su padre Leopoldo por el derroche de su vida y porque le había parecido mal que dejara de trabajar para el príncipe-arzobispo.

Continua escribiendo todo tipo de obras y el Emperador le concedió el cargo de "Kapellmeister"(Maestro de capilla) , pero con poco salario, lo que a pesar de escribir sus mejores óperas (*Las bodas de Fígaro, D. Giovanni y Cosi fan tutte)* y sinfonías, no le permitió salir del círculo de sus deudas.

Abrumado, escribió sus últimas óperas *Die Zauberflöte(La flauta mágica) y La clemencia de Tito,* escrita ésta en 1791 para la coronación del nuevo Emperador Leopold II. Es curioso que mientras ultimaba La Flauta Mágica, el emisario de un misterioso Conde Walswegg le encargó una Misa de Réquiem, que dejó inacabada por su propia muerte, acaecida el 5 de diciembre de 1791, a los treinta y cinco años, y que fue su última obra, terminada por su discípulo F. Sűssmayr.

Verdaderamente, este año escucharemos muchas composiciones de Mozart, pero el ideal, sería ir a Viena y Salzburgo para escucharlo en su propio entorno.

M. R. Ureña

Tra la Mondo

Esperanta Donkiĥoto ricevos 9.000 eŭrojn



Hispana Esperanto-Federacio ricevas du oficialajn subvenciojn por sia "Projekto Kiĥoto". Per la subvencioj, kiuj kune atingas la sumon de 9.000 eŭroj, oni celas internacie disvastigi la hispanlingvan kulturon, kaj samtempe informi pri Esperanto en hispanlingvaj kultur-rondoj.

Dum la jaro 2005 oni festas la 400-jaran datrevenon de la publikigo de la unua parto de la verko "La inĝenia hidalgo Don Quijote (mallongigo de informo en la retrevuo Libera Folio)

La Papo ne salutis esperantlingve



Post la kristnaska mesaĝo la Papo eldiris siajn bondezirojn en 31 lingvoj, inter ili ne estis Esperanto, lingvo uzata de Johano Paŭlo la 2ª okaze de Novjaro kaj Pasko.


Samkiel dum la antaŭaj benoj Urbi et Orbi, Kristnaske kaj Paske, ankaŭ ĉi-foje grupo de esperantistoj ĉeestis en placo sankta Petro por levi alte la panelojn kiuj konsistigis la vorton "Esperanto". La iniciato estis gvidata, kiel tradicie, de la itala samideano Giovanni Conti. La skribon Esperanto ĉi-foje tamen oni povis vidi nur tre fone dum la televida elsendo.



91-a Universala Kongreso de Esperanto

Florenco, Italio
29 de julio - 5 de aŭgusto 2006

Laŭ informo en la retpaĝo de UEA ĝis nun estas aliĝintaj 885 personoj el 45 landoj, el kiuj, nur 8 el Hispanio. Pro la proksimeco de la kongresurbo kaj ĝia kultura valoro, certe ĝi devus esti unu el la ĉefaj celoj de la hispana esperantistaro.La Kongresa temo estas ***Kultura libereco en la diversa mondo de hodiaŭ***. Oficiala oratoro ĉe la Inaŭguro estos la ĝeneva universitata docento Prof. François Grin, aŭtoro de raporto sendita al la franca ministerio pri edukado.



Anekdoto pri Einstein

Profesoro Einstein iam vizitis konaton en hotelo kaj lasis sian mantelon en atendanta taksio. Kiam li revenis, la mantelo estis for.
Tuj kolektiĝis homoj, kiuj komentis la okazaĵon: "Kulpas vi mem! Estas malprudente lasi mantelon en taksio."
"Kulpas la ŝoforo -- li devus gardi la mantelon!"
"Kulpas ankaŭ la pordisto de la hotelo. Li devus vidi, ke iu forkuras kun la mantelo."
Einstein diris: "Ĝuste, kulpas ni tri, sed ne kulpas la ŝtelinto, kiu ja devas vivteni sin."

En la Juvelejo

"Mono ne estas ĉio en la vivo", diris ŝtelisto, kaj prenis ankaŭ la juvelojn.

Antaŭ la Tribunalo

Juĝisto demandas atestanton: "Kiam vi vidis, ke la du viroj ekbatis sin reciproke per bierkruĉoj, ĉu vi ne povis pacigi ilin?"

"Mi tre volis, sinjoro juĝisto, sed mi mem ne havis bierkruĉon

Jugador prometedor

- Entrenador, ¿qué le parece mi hijo?
- Es un jugador muy prometedor.
- Ah, ¿es bueno?
- No, hace cinco años que me viene prometiendo jugar mejor

En el Fútbol

A por el árbitro En un estadio de fútbol:
- Papá, ¿por qué insultan todos a ese hombre?
- Por tirar una botella al árbitro.
- ¡Pero si no le ha dado!
- Por eso, hijo, por eso.

De vital interés

Con el fin de mantener, en la medida de lo posible, la llama del Esperanto en nuestra Ciudad y hacer llegar nuestro mensaje tanto a los socios y simpatizantes de nuestro querido Grupo "Fido kaj Espero" como a todos aquellos que en otros centros esperantistas, tanto de España como de otros paises, nos puedan leer, es necesario e incluso imprescindible la colaboración

Una de ellas, acaso la más importante, es la contribución económica, mediante el ingreso de doce euros o la cantidad que estiméis conveniente, nunca inferior, en la cta. 2096 0202 43 2369421600 de Caja España, con el fin de ayudar a los gastos de edición y envío del Boletín. A todos, gracias anticipadas, por vuestra incondicional ayuda.

PERIÓDICO

GRUPO ESPERANTISTA
Apartado, 119
47080 VALLADOLID